

Ĥ-19610/57

(1979)

l'esperanto *komplet* 1979: 1
revuo de itala esperanto-federaco



Enhavo

enmigrintaj laboristoj en Italujo
 gazzini, cappellani
granda biblioteko postulas sindediĉon
 el "hungara fervojista vivo"
kiujn lingvojn en UN? —
simpozio de ILEI en Parizo
 helmut sonnabend
starigita ekologia rondo esperantista
 bert de wit
internacia simpozio de sciencistoj —
la ora zekino —
klačangulo *ermes*
heroldo translokiĝas al madrido
 ada fighiera-sikorska
kafpaŭzo *bruĉjo kasini*
 freneze pier giorgio soranzo
la foiro de la veraĵoj
 clelia conterno guglielminetti
fine reago! *klenjo*
respondo al klenjo *viktor' dall'acqua*
25 jaroj *klenjo*
nova sento *mauro nervi*
el iej: ijf, tjap k.a. *dario besseghini*

anno 57 — gennaio 1979

sped. in abbon. post. gr. III/70 — reg. del tribun. di milano, n. 85 del 27 feb. 1970
direttore responsabile: antonio de salvo, casella postale 4017, 00100 roma appio
redazione tecnica composizione e grafica: *edistudio*, casella postale 213, 56100 pisa
amministrazione: *fei*, via villoresi 38, 20143 milano, pĉk. (c.c.p.) 37312204
stampa: *vallerini offset*, pisa
gratis ai soci — un numero lire 500
la opinioj esprimataj en la artikoloj subskribitaj ne necese koincidas kun tiuj de la direktoro de ĉi tiu revuo — nur la oficialaj komunikoj, krome, esprimas la opinion de itala esperanto-federacio.

surkovrile: *de temp' al tempo oni ree parolas pri la veneciaj kolomboj. La simpatiaj birdoj, kiuj tiom da problemoj kreas al la urbo, afable akceptos la esperantistojn partoprenantaj la 50an Italian Kongreson de Esperanto, venontaŭguste (foto Ansa / Presidenza Consiglio dei Ministri).*

Mi jam ne kuraĝas fari promesojn pri akurateco de ĉi tiu revuo: tro da fojoj mi devis konstati, ke pro diversaj kaŭzoj (grandparte ekster mia volo kaj mia influ-povo) ĉi tiu publikaĵo atingas la legantojn kun granda malfruo, malgraŭ ĉia zorgo por frua redaktado, kompostado kaj (sed ne ĉiam) presado.

Kiel konate, "L'Esperanto" naskiĝas el la kunlaboro inter direktoro en Romo, teknika prizorganto en Pizo kaj ekspedejo en Milano: pro tio, ne nur estas malfacile indiki kiu "kulpas" pri la malfruoj (kaj, cetere, temus pri senfrukta esploro), sed ankaŭ ne aspektas facile, en la unuaj cirkonstancoj, plibonigi la rezultojn sen modifoj de la organiza strukturo.

Pro tio, laŭ mia modesta opinio, aŭ oni sukcesos plirapidigi la teknikajn momentojn de la produktado de ĉi tiu revuo, aŭ estos oportune fari alian eksperimenton: ŝanĝi ĝian Direktoron.

Amike via

Antonio De Salvo

Enmigrintaj laboristoj en Italujo.

Kiom multaj estas la enmigrintoj en Italio, kiuj laboras aŭ studas? La analizo kaj la solvoj estis pridiskutitaj, antaŭ nelonge, okaze de kunveno organizita en Romo zorge de la Itala Oficejo pri Migrado.

La taksoj estas malsamaj. Laŭ la itala Ministerio pri Laboro, nur en Romo vivas almenaŭ 120.000 neleĝaj laboristoj el eksterlando. Laŭ la sindikatoj, en tuta Italio vivas 500.000 neleĝaj enmigrintoj el Afriko, Latinameriko kaj Mediteranea Eŭropo. La Centra Instituto pri Statistiko ne posedas certajn donitaĵojn. La Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj asertas, ke la fremdaj civitanoj loĝantaj en Romo de pli ol tri monatoj estas 50.000: el tiuj, 12.000 estas studentoj, 10.000 gereligiuloj, 7.000 privataj oficistoj, 400 servistinoj, 600 laboristoj, 600 ĵurnalistoj kaj profesiuloj, 500 komercistoj, 300 artistoj. En Milano, laŭ la dokumentoj liveritaj de la loka Labor-oficejo, la enmigrintoj el Afriko kaj Azio ne superas 4.000 homojn: sed, laŭ la roma kunveno, ili estas almenaŭ 80.000. Koncerne Napolon, la Polico parolas pri 300 homoj, dum la sindikatoj pri 600. Pli ol 40.000 estas la fremdaj studentoj en tuta Italio; 8.000 la filipinaj servistinoj, el kiuj 2.000 en Romo; tuniziaj fiŝistoj en Sicilio, polaj ministoj en Sardinio kaj Piemonto, maristoj en Ĝenovo, jugoslavaj mekanikistoj en Venetio, egiptoj en Emilio....

Ĝenerala statistiko pri la temo ankoraŭ ne estis farita, kaj la interministeria komisiono starigita por studi la kompleksan fenomenon de la enmigrintoj al Italio ne atingis gravajn rezultojn. Iu sindikatano, parolante pri la mankoj de la tiukampa itala



leĝaro, diris, ke venis la momento difini la aferon, ankaŭ ĉesigante kelkajn nenormalajn situaciojn, por certigi la partoprenon kaj la homajn rajtojn je ĉiu nivelo. La reprezentanto de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj substrekis, ke oni devas eviti la flankenmeton de la fremduloj, ilin enigante en la vivon de la nacia komunumo. Ankaŭ intervenis en la diskuto enmigrintoj el Zairo, Ruando, Filipinoj kaj Eritreo.

El la roma kunveno rezultis la urĝa neceso igi sentiva la publikan opinion kaj la politikan povon, koncerne la homajn, sociajn, psikologiajn kaj religiajn problemojn de la enmigrintoj: prokrasti la solvon de tiuj problemoj signifas perfidi la rendevuon kun homaj historioj, kiuj meritas solidaron kaj justicon.

teksto de Gazzini kaj Cappellani, traduko de Antonio De Salvo (laŭ Radio Romo).

Granda biblioteko postulas sindediĉon.

Antaŭ nelonge ni vizitis loĝejon de nia grupano en la centro de Budapeŝto, kie ni vidis privatan bibliotekon, pri kiu — okaze de la Tago de Esperanto-libro — nepre ni devas iom pli detale informi niajn legantojn.

La mirinde riĉa kaj precize ordigita kolektaĵo estas kvazaŭ fortikaĵo de Esperanto!

Libroj. Multaj libroj. En privata loĝejo ne kutima kvanto. De planko ĝis plafono. Károly Fajszki estas relative ne malnova esperantisto. Unue en la jaro 1966, okaze de la UK mi aŭdis lian nomon. Tiam cigaredoj, ĉokoladoj, ktp. kun Esperantaj etiketoj signis lian propagandistan agadon.

Lia kolektaĵo — kaj kolektanta agemo — en fakaj rondoj nun jam estas konata ankaŭ internacie, sed la vasta publika opinio preskaŭ nenion scias pri ĝi.

Kolekti esperantaĵojn tute ne estas facile, ĝi estas multekosta okupo. Kial pensis vi pri kolektado de esperantaĵoj?

Tute ne temis pri esperantaĵoj. Unue mi pensis nur kaj ekskluzive pri libroj. Mi volis vidi propraokule Esperantajn librojn, ĉe ni en la unua parto de la sesdekaj jaroj tre maloftajn. (La UK en Budapeŝto 1966 iomete mildigis la postmilitan Esperantolibro-malsaton, sed mi persone

nenion profitis el ĝi, ĉar tiam mi tute ne havis monon por libroj.) Sufiĉe frue mi renkontis la libron de Drago Kralj (*Kvar prelegoj pri la Esperanta Literaturo*, Ljubljana 1960). En la antaŭparolo mi legis:

“Mi neniel povis atingi multajn bezonatajn verkojn, studojn kaj revuojn kaj pro tio la konstatoj kelkloke baziĝas nur sur enciklopediaj informoj aŭ recenzistaj prijuĝoj...”

Poste mi legis ĉie kaj konstante la plendojn de la granduloj pro la elĉerpiĝo de la fontoj. Mi ne volas vicigi la sufiĉe konatajn faktojn. Eĉ Reinhard Haupenthal konfesas en sia *Enkonduko en la Librosciencon de Esperanto* (Nürnberg 1968, p.5): “Multaj el la listigitaj verkoj hodiaŭ ne estas aĉeteblaj.” Vere ne. Precipe ĉe ni.

Kiam vi komencis kolekti?

Antaŭ 7-8 jaroj. Unue nur “hungaraĵojn” mi serĉis, poste la librojn verkitaĵajn originale en Esperanto. Kompreneble striktaj limoj ne estas, ne povas esti. La Kalocsay-verko, eldonita en la Kanarioj, de si mem estas hungara, sed ankaŭ la *Kroataj poeziaĵoj* de Mavro Spicer, eldonita en Zagrebo, sed presita en Budapeŝto (1912), havas ian rilaton al hungara libro.

Kiel oni komencas kolekti sur nekonata teritorio?


Mi trastudis la grandajn publikajn bibliotekojn, la ne malpli modestajn kolektojn de esperantistaj kluboj. Privatuloj eĉ proksimiĝi ne permesis la novan, nekonatan kaj ĉefe nur balbutantan esperantiston al siaj garditaj trezoretoj.

La mondo de la Esperanto-libro estas preskaŭ ne travejbla. Ĉu, ĉe la komenco, vi havis ian imagon pri la komencata laboro?

Tute ne. Tempo post tempo el la reklamoj, trovitaj en la libroj mem, mi informiĝis pri la ekzisto de aliaj – ĝis nun nekonataj – libroj. Mi elkribis ĉiujn titolojn – feliĉe sur kartonojn – poste laŭ diversaj vidpunktoj vicig-eblajn.

Ĉu helpiloj, kiel bibliografioj, katalogoj, prezlistoj kaj similaj ne estis je via dispono?

Mi nenion sciis pri ilia ekzistado. Longaj jaroj pasis, ĝis kiam mi akiris kelkajn, utilajn helpilojn. Esperantobibliografion oni nenie instruas. Parolante pri literaturo estas memkompreneble, ke la literaturo havas korpon kaj tiu korpo estas la libro. Nia malriĉa bibliografio eĉ tiam ne sufiĉus, se estus akirebla. Nun mian – bibliotekistan – horizonton treege klarigas: Stojan, *Enciklopedio*, Davidov, Courtinat, *Esperanto en Perspektivo*, Hauptenthal, Takács, sennombraj jarlibroj, prezlistoj, ktp., ktp.



Fine la plej grava demando: el kio konsistas nun via kolekto?

Unue el libroj. Preskaŭ 3 500 diversajn titolojn mi sukcesis kolekti. Ĉiutagaj, grizaj libretoj, elegantaj luksaj eldonaĵoj kaj la plej ŝatataj: la unuaj, modestaj provaĵoj sur malbonaj paperoj, presitaj en sennomaj, nekonataj provincaj preseĵetoj. La hungaraj preskaŭ senmanke. Ĉiuj eldonoj. Mi klopodas akiri bibliografian kompletecon. Se oni eldonis ion sesfoje, mi provas trovi ĉiujn ses ekzemplerojn de la diversaj eldonoj.

Ĉu krom la libroj vi kolektas ankaŭ periodaĵojn?

Kompreneble. La periodaĵoj sentigas la pulsadon de la vivo. Modestaj, sensignifaj okazintaĵoj – menciitaj ie – el historia vidpunkto povas grandiĝi



kaj fariĝi gravaj fontoj simple per tio, ke oni notis ilin.

Kiom da revuoj vi havas?

Preskaŭ 400-500 jarkolektojn kompletajn kaj iomete pli ol 1500 por kompletigi. Ankaŭ ĉi tie la ĉefa tasko estas kompletigi hungarajn eldonaĵojn. Tre abunda estis ĉi tie la periodaĵeldonado. Sed bedaŭrinde nur malmultaj el inter ili travivis jarojn. Multegaj orfaj unuaj numeroj montras la kontraston inter la intenco kaj la ebleco.

Unue vi pensis pri libroj, poste kolektis ankaŭ revuojn. Kaj nun?

En Budapeŝto ne estas Esperanto-Muzeo. La malgrandaĵoj estas perdiĝemaj. La heredaĵoj de esperantistoj en la manoj de la ne informitaj familianoj — plej simple dirite — malaperas, neniĝas. Fariĝas balaaĵoj. Do, mi provas konservi ilin. Malgrandaj presaj, kiel invitiloj, programoj, enirbiletoj, ĉiuj, ĉiuj estas historiaj dokumentoj. Nian okdekjaran historion jam du mondmilitoj interrompis. Ne parolante pri aliaj memoraĵoj, perdigitaj okazintaĵoj. Mi malfermis mian koron kaj miajn ŝrankojn por ĉio

“Kion la Esperanta Cerbo

Ekde Adamo el si ŝvitas”

laŭ la vortoj de Kalocsay (*Rimportretoj*, Literatura Mondo, Budapeŝto 1931, p. 105, pri “Stojan”).

Jam de jaroj migras via ekspozicio de urbo al urbo. Kelkajn vortojn pri tio.

La ekspozicio en si estas ununura. Enhavas ĉiujn librojn, kiu havas iun ajn hungaran rilaton. Konsistas el multobligitaj titolpaĝoj — sur diverskoloraj paperoj. Por ekspozicii kune kun la klarigaj tekstoj, estas bezonata 40-50 kvadratmetra surfaco. Krome

apartenas al la ekspozicio kadrigitaj portretoj de ĉiuj literature signifaj hungaraj esperantistoj kaj granda serio de diversaj prospektoj. La celo? Propagandi inter la ne esperantista publiko kaj instrui la esperantistaron.

Kiamaniere oni povas atingi por ekspozicii ĉi tiun materialon?

Se oni invitas min, mi iras. Multaj grupoj, kulturcentroj, sindikatoj vokis jam ĝis nun. La zorgoj de ekspozicio estas la miaj, sed mi rigardas ĝin kiel havajon de la tuta esperantistaro. La instruado, klerigado estas ĉies tasko. El la granda komuna tasko mi ĉi tiun parton elektis por mi.

Viaj proksimaj kaj foraj celoj, revoj, planoj?

Kolektaĵo neniam povas esti kompleta. Mi ĉiam kolektas kaj konstante petas ĉies helpon. Eĉ en la formo de sensignifaj objektoj. Mi nenion petas senpage. Kelkcent valorajn librojn mi proponas por ŝanĝo, multnombraj duplikatoj el revuoj atendas la aliajn kolektantojn.

Ĉu foraj planoj?

Mi proksimiĝas al mia 70a jaro. El inter miaj gefiloj estas unu bona esperantisto, juna, sed profesie tre okupata. Eble iu Publika Biblioteko transprenos la tuton. Por donaci mi ne estas sufiĉe riĉa kaj mi havas kvar gefilojn, kvin nepojn. Mia naskiĝdomo forvendita antaŭ ne longe transformiĝis je mia libraro. Mi esperas, ke mi havos ankoraŭ kelkajn jarojn por kolekti, por kompletigi kaj ankaŭ la esperantista mondo havos kelkajn jarojn pensadi pri la sorto de la kolektaĵo de Fajszí Károly (1061 Budapest, Népköztársaság útja 27).

el “Hungara Fervoĵista Mondo”.

Kiujn lingvojn en UN?

En la praktiko, kiuj ŝtatoj uzas kiujn lingvojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN)? Ni fokusu nian atenton al la monda parlamento: la Ĝenerala Asembleo de UN. Feliĉe ni disponas pri la notoj faritaj de la iama aŭstralia ambasadoro ĉe UN., s-ro **Ralph Harry** (elpar. Ralf Heri): *Lingvaj baroj en UN*. En ĝi troviĝas 5-paĝa tabelo pri la temo. Ni trarigardu ĝin laŭlingve.

Angle parolantaj ŝtatoj.

En ĝeneralaj debatoj en la Ĝenerala Asembleo de UN parolas angle, krom la anglalingvaj ŝtatoj, ankaŭ ekskolonioj kaj ne-anglalingvaj ŝtatoj: Afganujo, Aŭstrujo, Bangladeŝo, Butano, Bocŭano, Brazilo, Birmo, Cipro, Danujo, Etiopujo, Finlando, Germana Demokrata Respubliko, Gano, Islando, Indonezujo, Irano, Israelo, Lesoto, Malajzujo, Maldivo, Malto, Mozambiko, Nepalo, Nederlando, Niĝerio, Norvegujo, Pakistano, Polujo, Somalujo, Srilanko, Surinamo kaj kelkaj aliaj. Eĉ la arablingvaj ŝtatoj Jemeno kaj Libano – laŭ notoj de s-ro Harry – parolis angle dum ĝeneralaj debatoj.

Arabe parolantaj ŝtatoj.

Arabe parolas nur dudeko da arablingvaj ŝtatoj.

Kiuj ŝtatoj ĉine?

Kvankam la ĉina lingvo kovras kvinonon de la homaro, en UN parolas ĝin nur Ĉina Popola Respubliko.

France: kiom da ŝtatoj?

Krom Francujo, parolas france: Albanio, Belgujo, Benino, Burundo, Centrafriko, Ĉado, Eburbordo, Gabono, Grekujo, Gvinebisao, Gvineo, Hajtujo, Kameruno, Kongo, Luksemburgujo, Malagaŝo, Malio, Niĝerujo, Rumanujo, Rŭando, Santomeo, Senegalo, Supravolto, Togo, Turkujo, kaj Zairo – kaj, el la arabaj ŝtatoj, Algerio, Komoro, Maŭritanio, Maroko, Tunizujo.

Hispane...

Parolas hispane dudeko da nur hispanlingvaj ŝtatoj.

Kaj ruse?

Ruse parolas: Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Mongolujo, kaj Sovietujo.

Ankaŭ en la aliaj lingvoj.

Manpleno da ŝtatoj parolas neoficialajn lingvojn: Kamboĝo, F.R. Germanujo, Italujo, Japanujo, Laoso, Portugalujo kaj Jugoslavujo propran lingvon (Jugoslavujo serbokroate) kaj portugalaj ekskolonioj Angolo kaj Verdakabo portugale dum la ĝenerala debato en la Asembleo.

Tamen necesas noti, ke en kelkaj kazoj la elekto de la lingvo dependas de personaj faktoroj. Do, povas okazi, ke nova reprezentanto de ŝtato uzas alian lingvon ol la eksa reprezentanto uzis. Kiam aperis la verko de s-ro Harry, *Lingvaj baroj en UN*, estis februaro 1977. Intertempe du novaj ŝtatoj membriĝis ĉe UN, t.e. Gibutujo kaj Vietnamujo. Ĉar en ambaŭ landoj influo de Francujo estis forta, estas eble supozi, ke ili parolas france en la asembleo.

Ĉiuokaze la lingva situacio supre vidita montras sin tre komplika.

Simpozio de ILEI en Parizo.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj I.L.E.I. organizas simpozion pri "Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia — eŭropa — lingvo", en la kadro de la U.E.R. pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko de la universitato René Descartes.

Tasko de la simpozio estos nomi lingvon, kiu povos esti komuna por ĉiuj sociaj, kulturaj, politikaj kaj ekonomiaj interrilatoj en la fondiĝonta Eŭropo. La temaro ampleksas la socian problemon kaŭzatan de la lingvodiverseco en internaciaj rilatoj.

La simpozio okupiĝos pri eblecoj kaj proponoj de solvo laŭ sociaj, ekonomiaj, politikaj, demokratecaj, lingvistikaj, pedagogiaj kaj fakteĥnikaj kriterioj, kiuj estu aplikataj al:

1. la latina lingvo;
2. la angla, franca, germana, hispana kaj rusa lingvoj;
3. projektitaj planlingvoj (Volapük, Ido, Occidental, Novial, ktp);
4. Esperanto.

La simpozio daŭros tri tagojn, de 1979.05.17 ĝis .19, kaj okazos en la universitato René Descartes, 12 rue Cujas, 75005 Parizo.

La unua tago antaŭvidas enkondukajn prelegojn en la temaron, dum la dua servos al pristudado de la demandoj en laborgrupoj. La trian tagon la laborgrupoj raportos pri la rezultoj antaŭ pleno; sekvos diskutado kaj eventuala rekomendo de unu lingvo kiel komuna komunikilo por Eŭropo.

Helmut Sonnabend.

Starigita ekologia rondo esperantista.

Unu el la ĉeftemoj de la SAT-kongreso en Lectour, Francujo, estis ekologio. La viglaj, ofte emociaj intervenoj dum la debato pri la sociaj aspektoj de ekologiaj problemoj montris, ke multaj kongresanoj sin sentas envolvitaj en la aktuala problemaro.

Ĉefa demando, en la diskuto pri la starigo de ekologia frakcio de SAT, estis: ĉu ni, kiel esperantistoj, povas iamaniere kontribui en la agado de la diversnaciaj medio-protektaj asocioj? Aŭ ĉu ni estas ne kompetentaj rilate tion? Oni konkludis, ke la ofte aŭdata argumento, ke nur specialistoj decidu ekzemple pri la konstruado de atomcentraloj, estas danĝera, pro tio, ke tiuj teĥnokratoj ofte nur vidas unuopan aspekton de la problemaro, kaj preteratentas, vole aŭ nevole, aliajn aspektojn, ofte socipolitikajn. El tio jam oni povas ĉerpi taskon por ekologia rondo esperantista, nome zorgi pri kleriga literaturo sur ekologia-politika tereno. Tio povas esti realigata per eldonado de broŝuroj, kaj per regula verkado de artikoloj por la Esperanto-revuoj. Alia tasko, kiun ekologia rondo esperantista povus havi, estas praktika laboro, nome kolekti informojn pri la aktivado de ekologiaj grupoj, interŝanĝi spertojn aŭ ĝeneralan informadon pri ekologiaj problemoj. Precipe el orienteŭropaj landoj mankas informoj pri ekologiaj problemoj: Esperanto povus ludi rolon en tio.

Oni nun kolektas la adresojn de tiuj, kiuj interesiĝas pri ekologiaj problemoj kaj volas iamaniere kontribui. La aktivado ne estos limigita al la membroj de SAT; provizore kunordigas la agadon s-ro Bert De Wit, Leidsevaart 52, NL-2114 AD Vogelenzang, Nederlando.

Bert De Wit.

Internacia simpozio de sciencistoj.

La ora zekino.

Marilja, brazila urbo kun 150 000 loĝantoj, je 460 km. nordokcidente de São Paulo, fariĝis ĉefurbo de Esperanto en Sud-Ameriko, de la 17a ĝis la 22a de julio 1978. La 1-a Latin-Amerika Esperanto-Kongreso iĝis impona kaj elstara kun bonega rezulto. Ĝi fariĝis taŭga provejo de la organizaj kapabloj de brazilaj esperantistoj, antaŭvide al la 66a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo Brazilio en la jaro 1981.

Nun la urbodomo de Marilja invitas la esperantistan sciencistaron partopreni la 50-jaran jubileon de tiu urbo, kiu fariĝis fokuso de daŭra evoluo en la okcidento de la stato São Paulo. Marilja sendube jam nun estas iaspeca ĉefurbo de la movado en Brazilo, kaj dum sia 50a jariĝo la 4an de aprilo 1979 la urbestro, d-ro Theobaldo de Oliveira Lyrio, subtenos la tre gravan aranĝon de esperantista sciencistaro, kun celo kunigi la homojn el la scienca medio kaj ebligi al ili trakti sciencajn aspektojn kaj problemojn en Esperanto.

De la 12a ĝis la 16a de aprilo okazos en Marilja la 1a Internacia Simpozio de Esperantistaj Sciencistoj, en la kadro de la 50-jara jubileo de la urbo. La temo de la simpozio estas "La sciencaj kaj teknikaj problemoj en Esperanto"; ĝi dividiĝos en sesiojn pri fakaj kaj specialaj aspektoj de la sciencaj informfontoj en la mondo; en ĉiu sesio specialistoj diskonigos resumojn de siaj prelegoj. La materialo de la simpozio kaj ĝiaj kokludoj estos publikigitaj, kaj la organizantoj eĉ intencas eldoni apartan libron kun kompleta materialo. La publika atento estas jam vekita; invitataj estas ĉiuj esperantistoj de la fakaj kaj specialaj kampoj, ne nur por

La 18an de oktobro 1978a okazis en Bolonjo, ĉe la franciskana instituto *Antoniano*, la 21a eldono de la "Ora Zekino", la plej granda monda konkurso de kanzonoj por infanoj, sub la patroneco de Uniĉef.

En la kadro de la aranĝo, dissendita de la televido de preskaŭ la tuta mondo, la respondeculo de la Eŭropa Sekretariato por la Internacia Jaro de l' Infano (kiu okazos en 1979) legis kortuŝan mesaĝon por la etuloj kaj la plenkreskuloj de la tuta mondo, samkiel faris, en la respektivaj lingvoj, la malgrandaj fremdaj konkursantoj.

Esperanto ne povis manki en ĉi tiu aranĝo, kiu celas internacian kompreniĝon; kaj, fakte, ankaŭ ĉijare la mesaĝo estis legita ankaŭ en la internacia lingvo (kunlaboris tiucele pastroj Albino Ciccanti kaj Duilio Magnani el Rimini, kaj prof. Giuseppe Casagrande el Bolonjo).

pridiskuti internacie "sian" specialaĵon, sed ankaŭ por plivastigi siajn interesiĝojn en aliaj kampoj. La simpozio okazos ĉe la moderna salono de la Regiona Medicina Sidejo, avenida Pedro de Toledo 179, Marilja, S.P.

*

La kontraŭuloj al Esperanto, aŭ pli ĝuste al Esperanta movado, ofte nin akuzas esti anarĥieme individuaj, dum kunvenoj havi pli da opinioj ol da ĉeestantoj kaj laŭvice gajni podion nur por kvereli kaj sin senti oratoro aŭ gravulo, proponi kaj programi ĉion kaj poste realigi nenion, emi al ronda familio kaj ignori la fremdulon, ktp. Por rebati ĉi tiujn atakojn sufiĉas raporti pri la ekzemplodona jarkunveno de itala MEM, Mondpaca Esperanto-Movado, dum la kongreso en Ĉezeno.

Sen tempoperdoj kaj formalaĵoj tuj ĝin estris s-ro Riccardo Natale Pinori, por la amikoj Riki, kiu post rapidaj salutoj malfermis la laborojn laŭ tre preciza tagordo. La unua punkto, la pasintjara agado, postulis malmultajn minutojn: s-ano Natale informis ke, escepte de kelkaj individuaj varbadoj por *Paco* (kun majuskla p, ĉar ĝi estas la internacia revuo de MEM), nenion oni faris sed oni pripensis eldoni asocian bultenon, esperante havi sufiĉajn abonantojn. S-ro Riccardo poste pritraktis la duan punkton: estontan laborplanon. Li substrekis la neceson aboni *Pacon*, la revuon kiu nuntempe ĝuas la favoron de la demokratiaj

landoj ("la tiel diritaj demokratiaj" — li laŭvorte diris, eble imagante ke ili estas pli bone konataj kiel socialismaj aŭ komunismaj), kaj tuj eniris la kernon de la programo: eldoni italan MEM-bultenon. La iniciato evidente estis sufiĉe pristudita pasintjare, ĉar la oratoro jam povis anonci ĝiajn precizajn celojn: la bulteno fariĝos asocia informilo, ligilo por la anoj kaj propagandilo por la aliaj. Fine li detale analizis kelkajn organizajn problemojn pri tiu periodaĵo kiu, nekredeble, jam havas tujan redaktoron; s-ro Riki fakte proponis por tiu posteno la japanan s-ano Sato, ĉeestanta kun la tre apude sidanta fianĉino. Oni ne komprenis, ĉu li ne konas la italan kutimon ŝarĝi la aliajn per farendaj laboroj, aŭ ĉu estas lia destino esti fiŝkaptita, aŭ pli simple ĉu li ne ankoraŭ bone konas la italan lingvon (kiu estas regule uzata dum niaj kunvenoj, ĉar hipoteze povus ĉeesti ĵurnalistoj kaj aŭtoritatoj), tamen estas fakto, ke li ne protestis, sed ĉarme ridetante li klinis sian kapon. La aprobanta kunrideto de la itala fianĉino konfirmis, ke li jesis, ne salutis. Post reliefigo de tiu ĉi internacieca aspekto de la bulteno, danke al fremda redaktoro, s-ro

L'Eco della Stampa

UFFICIO DI RITAGLI DI GIORNALI E RIVISTE

Via G. Compagnoni 28 - Tel. 72.33.33-20129 MILANO

CASELLA POSTALE 3549 - 20100 MILANO

FONDATA NEL 1901

Direttori UMBERTO FRUGIUELE - IGNAZIO FRUGIUELE

Natale deziris koni la opiniojn de la ĉe-estantaro, kaj transdonis la parolon al d-ro Korseti (por Esperantujo nia *Corsetti* elektis fonetikan tradukon, anstataŭ la laŭsignifan Korsetoj), kiu per tri vortoj esprimis sian konsenton kaj poste aldonis ne havi ion aldonendan.

Tiam s-ano Riki konstatis, ke la tagordo estis plenumita, kaj memorigante la neceson varbi abonojn, proponis fermi la laborojn. Sed iu atenta partoprenanto rimarkigis, ke tagordo antaŭvidas trian punkton: “diversaĵoj kaj eventualaĵoj”. Guste! Li tuj ricevis la parolon kaj, pruvante, ke li vere sekvis la debatojn, kohere demandis pri... la enhavo de la bulteno! Al la respondanto, la fama Pinori, brilis la okuloj ĉar li, kompetenta kaj serioza respondeculo, jam pristudis la problemon, eĉ inteligente utiligante la spertojn de aliaj specialistoj pri tiu fako. Fakte, li trafte respondis, ke la bulteno enhavas taŭgajn artikolojn, kiel eble plej altnivelajn, kun laŭcelaj titoloj. Li eĉ detale aldonis, ke la paĝ-nombro kaj la paper-kvalito dependas de la financaj rimedoj, kiuj praktike estas proporciaj al la abonantaro. Li kaptis la okazon por instigi al varbado de abonoj al ĝi, kaj ne forgesis paralelan komparon kun la konata revuo *Paco*. Kohera estis la konkludo: oni devas same agi por tiu ĉi lasta.

Ĉar ĉiuj estis silente konsentaj kaj la tagordo estis plenumita, sinjoro Pinori fermis la jarkunvenon per *memideanaj* salutoj klarigante ke “por informoj aŭ io ajn, ĉiuj povas sin turni al mi MEM”. Rapide sed bonedukite ĉiuj naŭ kunvenintoj eliris la ĉambron, eventuale por ĉeesti aliajn laŭ-programajn jarkunsidojn.

Ermes.

Heroldo translokiĝas al Madrido.

En sia 58-jara ekzistado, *Heroldo de Esperanto* nur dufoje ŝanĝis la eldonlandon: unuafoje en 1936, kiam – antaŭvide al naziaj persekutoj – la fondinto, Teo Jung, forlasis Kolonjon kaj instalas la gazeton en Hago (Scheveningen); duafoje en 1962, kiam la redaktadon transprenis s-ino Ada Fighiera Sikorska, loĝanta en Bruselo.

Nun la familio Fighiera translokiĝos al Madrido, kaj *Heroldo* sekvos ĝin. La kaŭzo estas, ke s-ro Gian Carlo Fighiera, prezidanto de la laŭlega senprofitcela societo, kiu eldonas la gazeton, akceptis novan postenon en la hispana ĉefurbo, ĉe interregistara organizaĵo apartenanta al la familio de Unuiĝintaj Nacioj: lia unua tasko estos prepari la Mondan Turisman Konferencon, kiu okazos en Manila, en 1980.

La hispana epoko de *Heroldo* komenciĝos en aprilo aŭ majo 1979. Nenio ŝanĝiĝos en la aperitmo: ĉiuj 17 numeroj kaj la aldonaj suplementoj regule sekvos unu la alian: aparta klopodo estos farita por plibonigi la enhavon, i.a. per enkonduko de nova lingvorubriko por progresintoj.

La eldonplanoj ricevos novan swingon, ĉar eldonejo “Heroldo” specialiĝos en la eldono de altkvalitaj nacilingvaj Esperantaj lernolibroj, verkataj laŭ modernaj pedagogiaj kaj metodologiaj konceptoj de spertaj esperantistaj lingvo-instruistoj. La du unuaj, nun finverkataj, estos angla kaj franca lernolibroj de William Auld kaj Emil Van Dramme. Do, la translokiĝo al Madrido praktike nenion ŝanĝos ĉe *Heroldo de Esperanto*, escepte de tio, ke ĝi donos novan vivon, novan impulson.

Ada Fighiera-Sikorska.

Alia rubriko, ho! La ĉampanbotelo ĵus frakasigis kontraŭ la pruo de ĉi literatura boateto, kaj jam sur la kajo, kun la aplaŭdoj de kelkaj, iras la flustroj de multaj: kial beletra rubriko en revuo de landa asocio?, kiel ĝi povas utili al la loka agado, al la ĉarmaj-intimaj klubvesperoj?

Ni diru, ke estas du ĉefaj kaŭzoj por ĉi-paĝo: la unua, ke meze de informoj movadozaj, je kiuj plenas kutime ĉi-revuo, iom da distro, da bona prozo aŭ poezio, povas malstreĉi la nervojn de la legantoj, kiel kaftaso aŭ cigaredo dum paŭzo en la oficeja laboro; la dua, ke ofte ni ne havas alian materialon en sufiĉa kvanto — kaj en sufiĉa kvalito — por plenigi nian revuon; do, se kelkaj legantoj sentas sin malpozitive tiklataj de la apero de literaturaĵoj en sia revuo, bonvolu ili mem sidi ĉe skribmaŝino kaj verki taŭgan artikolon: se ĝi estos en flua Esperanto, ĝi havos grandan ŝancon trovi la ĝustan pordon por eniri en unu el la venontaj numeroj.

FRENEZE.

— Cigaredon, ĉu?

La banala, gurdita, enkonduka... uverturo!

Ordinare la tono impresas ĝentile indiferenta, sed ĉifoje ĝi sonis esence galanta pro enigma sensacio, pro ne-kontraŭstarebla intereso kiujn estigis

Kaj, kio aperos en ĉi beletrejo? Nu, prefere originalaj verkoj, rakontoj aŭ poemoj, se eble de italaj verkistoj (sed la Okulviroj de la Majstro gardu nin de ŝovinismaj impulsoj). Kaj se ĉi nia laboro portos ankaŭ nur unu pluan esperantiston al kono kaj ĝuo de sia literaturo, se ĝi sentigos lin parto de granda kultura movado, kaj ne nur de verda revantaro, ni taksos nian celon plenumita, kaj foros, kun unu el niaj plej grandaj poetoj:¹

Skribistoj, notu miajn vortojn:

mi kredis min sola kiel la ĉiomo. Mi herezis.

...

Poemoj estas atestantoj.

Bruĉjo Kasini.

1. Sadler, Victor, *Memkritiko, poemaro*, [Kopenhago], Eldonejo Koko, 1967, p. 60; la citaĵo estas el la poemo "Pledo", pp. 50-51.

en mi la rave ĉarma fraŭlino. La blanka arte trikita bluzo, la laŭmode alĝustigitaj slimkoloraj pantalonoj reliefigis ian gracian kaj elegantan silueton, dum korve nigra frizaĵo ornamis simpatian vizaĝon. Estis io milda ĉe ŝi: ŝiaj okuloj, ĉielarke esperigaj, esplormine min traboris; ŝia ekstaziga rigardo sage trafis mian koron, kies batoj

aŭtomate frapadis pli rapide. Finfine, ŝi kunsente kapjesis, elprenis cigar-edon, mielolipe dankis kaj, sen atendi flamon, abrupte sin turnis kaj forvaporiĝis en kirliĝantan dancantaron.

Pro ŝoka surprizo, gapokule mi rigardaĉis mian ekbruligontan fajrigilon.

— Fraŭlinoo! Hola, fraŭlinooo!

Sed miaj alvokoj disiris forglutitaj de la bruo kaj muziko. Senhezite mi postkuris ŝin, sed ronda bariero de gajuloj stultmiene ritme svingiĝantaj malpermesis al mi daŭrigi la ĉasadon inter la ondiĝanta ĉeno. Mia embaraso ŝvelis, malgraŭ mia senemocia karaktero, ĉar la sceno naskis ridetojn rikanantajn ĉirkaŭ lipoj de iuj nenifaruloj, scivole tie grupiĝantaj.

— Be! Ŝi ne estas la sola virino ĉi tie —, interdente mi murmuris katenante pikajn vortojn svarmantaj laŭlange kaj, kun flegme afekta paŝado, mi eliris el la fumoplena kaj surdiga dancejo. Subkonscie venis en mian kapon la fama fablo pri la vulpo kaj vinbero...

Silenta oktobra nokto ĉirkaŭbrakis min per stelita aŭtunĉielo, dum ĥoro de krikrietantaj griloj invitis min al plua promenado. Sonoris jam nokto-mezo, tamen, spite al morgaŭa laciga deĵoro, mi ne intencis hejmeniri. Cetere, malvarmeta aero delikate karesadis miajn kolerbrulantajn vangojn.

Akompanis min, laŭlonge de lumigita aleo, la rememoro pri la venta bubinaĉo kiu, kvazaŭ malprude, restigis min sola skuadi pajace mian fajrigilon meze de la festenejo.

Verdire (sed tion nur flustre mi kuraĝas konfesi), mi aventureme iris tute sola al dancofestoj (kaj nur post kubutpuŝa enviciĝo mi sukcesis aĉeti enirbileton), sed la ofenda konduto de la friponino vundis mian fierecon tiel, ke mi sentis min des pli sola!

Nur tio mankis: ke ŝi eligu sian langon al mi.

Ĉu ŝi ĉeestis kun fianĉo? Ĉu kun koramiko? Ŝiaj pianistine diafanaj fin-

groj — sen ora ringo — okulfrape evidentigis al mi (verŝajne nur al mi...), ke ŝi ankoraŭ ne edziniĝis... Ĉu ŝi ne volis vekigi babilaĉojn restante sola kun mi eĉ dum amuzplena dancofestoj? Hm! Ĉiokaze ŝi kondukis mezepoke!

Absorbita en tiel akre pendanta disputado, mi ne atentis laŭ taŭga merito petolan allogon de frivola ĉiesulino kiu koketis apoge al la kutima elektra starlampe. Eble mi gape miris al ŝi, ĉar subite ĉio ŝajnis ridindigi min: la arboj, eĉ la luno sarkasme kliniĝis super min blovante mokojn. La starlampoj mem kompateme balancis sian globluman kapon.

Angoro min tremigis.

Konsternite, mi fuĝis laŭpove rapide por ne aŭdi tiajn klaĉojn; sed ĉio postkuris min. Morde satira ridego eĥiĝis ĉie. Senespere mi akcelis, diskuris, sed vane: malantaŭ mi eĉ la festena kanajlaro aŭdigis sian ĉielskuan muĝadon. La strato plilongiĝis dum galope mi saltkuregis zigzagante kiel fendlipa leporo, por kaŝe savi min. Jam pene mi spiradis, jam raspa ŝvito skrapis miajn okulojn kiam, meze de la senfina, senkaŝeja strato, sorĉe aperis ŝi, la magneta silfino!

Ŝanceliĝe mi hezitis. ne sciante kion fari. Tio permesis al boja persekutantaro kapti min: fiulo el inter ili trafis per ŝtona pugno mian konfuzitan kapon. Svene mi teren falis... kaj ŝajnis al mi vagi en aero kiel disfluganta birdeto...

■ ■ ■

Ĝemante mi vekiga. Kie mi estas? Kien oni piedbate jetis min? Oj! La kompatinda mia kapo!

En mia korpo, remburita kiel ĉastrofeo kaj ensorbegita de rosumo, kadence resonadis la bruo de mia dentgrincado.

Voĉo de rutinulo diktas, kun senŝanĝa tono, nekompreneblaĵojn.

Pesta fenola miasmo ŝvebas en miaj nazotruoj.

Nu, kie mi estas? Ĉu en hospitalo? Kio okazis al mi? Aj! Miaj tretitaj ostoj! Kial oni sternis min sur dorna lito? Ĉu ĝi blanka? Ĉio aspektas blanke ĉirkaŭ mi.

Dume, konfuzkontura figuro alproksimiĝas al mi!

Homvorte ne esprimeblas la mirindaĵo: kiel ajn nekredeble ŝajnas, miaj preskaŭ nevidkapablaj okuloj abrupte enfokusigas ŝin, la okulglimantan

feinon, la svatindan fraŭlinon de mia delira sonĝo.

Min kaptis nepriskribebla ĝojo.

Mi estus volinta kanti, kriegi, plengorĝe hurai... sed mi sukcesis balbute elbuŝigi nur abelan zumadon.

Kaj sendolora injekto (ha! Ŝiaj veluraj manoj...) dronigis min en ripozigan dormon, dum anĝeloj paradize muzikis en mia koro!

*Pier Giorgio Soranzo.
el la Belartaj Konkursoj de UEA.*

La foiro de la veraĵoj

recenzoj

prizorgas clelia conterno guglielminetti

Fine reago!

Kun vera plezuro mi publikigas ĉarman, inteligentan reagon de leganto-aŭtoro, certigante lin, ke li ja multe pli lertas gramatike ol muzike. Nu, mia rondelo estis koktelo, kaj en koktelon oni ja enmetas ankaŭ iom da amaraj suktoj. Ĉu estas preferinda recenzanto kiu vere legas kaj presas la librojn ol tiu, kiu kontentiĝas per "bela, bela, belega!" kaj donacas la malfermitan ekzempleron kiel kristnaskan omaĝon al iu konatulo?

Klenjo.

Respondo al Klenjo.

Konterno Klenjo ĉiam bravas,
ŝi majstras l' arton de l' kritiko.
En recenzad', kun sorĉefiko,
la plumo ŝia kapte ravas.

Sed... ĉu ŝi laŭdas aŭ kontraŭas?
Misteroj de dialektiko.
Konterno Klenjo ĉiam bravas,
ŝi majstras l' arton de l' kritiko.

Ŝi rajton je licenco havas;
nur dub': se kiel pri muziko¹
mi lertas pri la gramatiko,
ĉu ŝi en ambaŭ kazoj pravas?

Konterno Klenjo ĉiam bravas.
Viktor' Dall'Acqua.

1. Mia kono pri muziko limiĝas al la sep notoj.

*mendu ĝin ĉe: "Edistudio"
casella postale 213, 56100 Pisa.
Prezo: 3850 liroj, inkl. sendokostojn.*

25 JAROJ

Antologio de Belartaj Konkursoj
Hungara Esperanto-Asocio
Budapeŝto 1977.

Ĉu bona, ĉu malbona ideo kolekti en volumo la plej signifajn verkojn prezentitajn dum la Belartaj Konkursoj en la spaco de dudek jaroj? Nu, unuavide, praktika ideo. Ĉiu kompilisto de legolibroj, ĉiu gvidanto de duagrada kurso havos submane la materialon, kiun li povus bezoni: fakte, ne ĉiuj eroj estus alimaniere facile atingeblaj. Kaj, plue, per ne dika antologio oni povas konstati la evoluon de nia prozo kaj de nia poezio tra kvarono de jarcento. Neregule, sed senteble, ni vidas ĝin evolui de iom amatora stadio al supera memstareco. Ĝenas, tamen, la alfabeto ordigo: estus preferinde, de historia vidpunkto, trovi la pecojn sinsekve laŭ la jaroj. Kaj la kriterioj de la elektado ŝajnas al mi nebulaj. Ni tre ŝatus klarigojn pri ili, ĉar, ke temas, ekzemple, pri la plej rimarkindaj produktaĵoj, tio nenie estas dirita. Aŭ ĉu oni elektis po unu verkon de ĉiu aŭtoro? Sed kelkaj nomoj mankas. Aŭ ĉu ludis ian rolon la persona prijuĝo de la prizorgintoj?

Estu kiel ajn, ni akceptu dankeme la penon de *Auld* kaj de *Benczik*, kiuj tamen ne estis en gaja humoro kiam ili elektis la pecojn: vi certe rimarkos, ke pesimismaj sintenoj, mortosentoj, kadavroj ofte videbligas en la prozaĵoj, kaj ankaŭ en la poemoj. aŭ ĉu oni devas konkludi, ke malĝojō karakterizas nian literaturon?

Ni turnas la demandon al niaj legantoj.

Klenjo

*mendu ĝin ĉe: "Edistudio"
casella postale 213, 56100 Pisa.
Prezo: 8250 liroj, inkl. sendokostojn.*

Nova Sento

rubriko de itala esperantista junularo

*redaktas mauro nervi
viale italia 211, la spezia*

EL IEJ: IJF, TJAP k.a.

Ĉu jam alvenis al via domo nia IEJ-sendaĵo kun la skizo de la trijara agadplano? Se io tia ankoraŭ ne alvenis, kaj vi estas juna IEFmembro, vi nepre devas kontakti nin ĉu per aliĝo al la IJF, ĉu per simpla protestletero. Pro organizaj fuŝoj, pri kiuj ne kulpas la junularo, ni (la estraro) eĉ ne konas viajn adresojn. Viaj leteroj ilin povus konigi al ni . . .


. . . kaj eble tiaj fuŝoj ne plu okazos se ni sukcesos refunkciigi tiun nian povran IEJN, kiu glornomas sed ne plu tiel bone agis dum tiuj ĉi lastaj jaroj, eble pro tio, ke ne ekzistis vere klaraj bildoj pri kialoj kaj kieloj: ĉu dece, por unu el la surpapere plej grandaj TEJOsekcioj? Oni devas reeklabori, eventuale per tiu trijara agadplano (TJAP), kiun la estraro elverkis, kaj kiun diskutos la JarAsembleo en *Massa* ĉipaske. Ties teksto estas je via dispono ĉe nia adreso — kaj se vi volas diskuti ĝin, nepre aliĝu al la Festivalo, ekpartoprenu en la asocia vivo. . .

. . . kaj ja ĝuu tiun unikan okazon spekti preskaŭ ĉiujn gravajn E-muzikulojn unufoje kune, venu al *Massa* por ekkoni aŭ retrovi nian E-Junularan kulturon, ne putriĝu en la ĉiutaga klubvespera vivo. . . ke tiu Festivalo per via partopreno ne estu nur okazo por la organizintoj renkonti malnovajn amikojn, sed estu pli kaj pli la Festivalo de IEJ, via, nia, ĉies Festivalo. . .

Dario Besseghini.

marina
di massa
(italujo)


3a internacia junulara festivalo
12-16.04.1979



*internaciaj
kulturaj interŝanĝoj
per muziko*

aliĝilojn petu al: **iej**
itala esperantista junularo
poŝtfako 210
(italujo) - pisa
pĉk 22-17892

Neniu plu kredas, ke bebojn
alportas
cikonioj



Estas egale naive kredi, ke nia Movado povas senpene rejunigi sin.

Ne dubu, ke tiu rejunigo estas nepra. La Movado levis Esperanton el la kategorio de planlingvo kaj tenas ĝin vivanta. Ĝi devas ankaŭ teni sin mem vivanta, kaj kapabla je vivregenero. Tio postulas konscian planitan agadon konstante allogi novajn membrojn, junulojn inter ili. Nia Movado bezonas do sian propran cikonio-servon. TEJO povas per via helpo tiun servon alporti.

TEJO estas tegmenta organizo por la junularo. Ĝi havas 30 Landajn Sekciojn. Vi povas legi pri la ĵusaj laboroj de TEJO en la

Jarraporto de UEA en la junia numero de "Esperanto". Vi povas informiĝi pri la strukturo, kaj funkciado de TEJO en la Jarlibro 1978, kies sur la paĝoj 31 ĝis 37 aperas ampleksigita priskribo de la Organizo kaj ĝia agado. Tiun agadon vi bele subtenos donacante al la TEJO-fondaĵo, instigante viajn amikojn membriĝi al TEJO, aboni "Kontaktton", aŭ fariĝi Patronoj de TEJO.

Fortigu la cikionon!

tejo

atentanta hodiaŭ la generacioni de morgaŭ